

9/11. Sed la teroristoj multon pli trafis ol ili esperis, ĉar la atendado kaj timo pri alia atako, kiun antaŭenigas la amaskomunikiloj, sufiĉas por daŭrigi tiun timon. La teroristoj povas aŭ longe ferii aŭ celi aliulojn, kiel ili jam faris en Indonezio, ĉar la atendado pri atako ne facile forvelkos.

Ĉu la situacio estas tiel malbonega, kiel kredas Yves? Sendube en kelkaj kazoj, jes. Multajn senkulpulojn oni 'retenis' ĉar la Administracio *devas* montri, ke ĝi faras sian laboron kiel en "Fahrenhejto 451" (far verkisto de sciencfikcio Ray Bradbury) en kiu la registaro telesendas la mortpafadon de senkulpulo dum voĉo diras al la spektantoj, ke la viktimo vere estas la ĉasito.

Mi memoras kiam, mallonge post la Dua Mondmilito, mi ĉeestis kongreson en Detroit, Miŝigano. Grupo de ni decidis turistumi en Vindsoro. En la grupo troviĝis ulo kaj lia milit-edzino el Anglio, kiu ĵus alvenis al Usono proksimume du tagojn antaŭ la kongreso. Ŝi ankoraŭ ne havis sufiĉan tempon por akiri usonan pasporton kaj timis ke, post ŝi envenis en Kanadon, ŝi ne rajtos reveni al Usono. Ni ĉiuj certigis al ŝi, ke ni atestos por ŝi kaj ne estos problemo. Niaj certigoj nenion validis. Ŝi konvinkiĝis ke oni ne permesus al ŝi reveni.

Nu, mi mencias tion nur pro la fakto ke Yves certas ke, kvankam li estas kanada civitano, eble li havos problemojn. Tio estas dubinda sed, ĉar li kredas tion, oni tute ne povas malinstigi lian kredon. Li kredas ke egiptano aŭ alia proksima orientulo pli verŝajne spertos problemojn, sed tio ne devus preventi lin ĉeesti kunvenon en Vermonto. (Oni jam severe kritikis "profiladon"*, sed oni ne serĉus azianon se la fifarulo devenas de Proksima Oriento. Simile temas pri bank-rabistoj aŭ iu alia krimulo. La kontraŭargumento al profilado estas nur tio, ke profilado estas tro vaste aplikata, kaj multaj senkulpuloj kaptiĝas en ĝia reto.)

Kiel mi jam diris, ĉi tio ne mildigos la timon de Yves aŭ eĉ klarigos tion, kio okazos. Paniko kaj timo estas teruraj aferoj. Oni nur dissolvas ilin per kredo, fido kaj restarigo de nia regado de juro. Aŭ ĉu mi estas tro naiva? Mi kredas ke ne, ĉar estas tro multaj el ni ĉi tie en Usono kiuj komprenas la situacion por tio, kio ĝi estas, kaj kiuj laboras por rekapti la konfidon de nia regado de juro, kio forvelkis dum multaj jaroj. Kiam la Administracia kaj Juĝista Instancoj komencas fari leĝojn kaj la Leĝodona Instanco ne faras ion ajn por halti ilin, tiam oni scias ke la lando havas pli grandan problemon ol tio, kion povas suferigi iu ajn teroristo.

— Ed Harler

* "Profilado" ĉi tie sugestas antaŭjuĝon, fremdofobion, elekton por aparta atento surbaze de videblaj trajtoj kiel raso kaj deveno.

— la red.

NEATENDITA SIMBOLO

Estimata Redaktoro,

Lastatempe, kiam mi estis en Usono, mi vizitis la urbon SanFrancisko, kie estas multaj neordinaraj aferoj por vidi. Tamen, unu viditaĵon mi tute ne komprenas. En la urbomezo mi vidis framon de biciklo fiksitaj al lumfosto per peza ĉeno. Estis nek radoj nek selo, nek stirilo nek pedaloj - nur framo, kvazaŭ skeleto, sed tre sekure fiksitaj.

Do, mia demando estas: kial oni alportus framon de biciklo al la urbomezo kaj fiksus ĝin per forta ĉeno al lumfosto?

Mi estas tre scivolema kaj esperas, ke vi povos klarigi al mi la misteron.

Sincere la via,

Kon Fu Zita

Estimata S-ro Zita,

Multan dankon pro via kaptiga demando, kiu ligas min al la stango de respondeco por oferti respondon. Kvankam mi ne certas pri la ĝusta respondo, mi esperas trovi taŭgan ŝlosilon por malŝlosi klarigon por vi.

Mi mem neniam vizitis tiun urbon, sed, laŭ mia kompreno, la loĝantaro multe ŝatas veturi tien kaj reen laŭ la stratoj de San-Francisko. Nelonge post la fondiĝo de urboj en okcidenta Usono estis la erao, kiam oni kutime vojaĝis per ĉevalo aŭ, se riĉa, per vagono aŭ kaleŝo tirita de ĉevaloj. Tiutempe, dum oni vizitis provizejon aŭ drinkejon en la urbo, oni ligis la ĉevalon per kondukrimeno al fosto aŭ barilo por malebligi al la hufulo forvagi. Oni ne multe timis pri ŝtelo de ĉevalo, ĉar preskaŭ neniu kuraĝis malobei leĝon kun tiel severa puno. Tamen, sendependaj ĉevaloj fojfoje mordetis senzorge ŝnuritan ligilon kaj forvadis. Iom post iom veturado evoluis kaj oni komencis uzi aŭtojn anstataŭ kaleŝoj, motorciklojn anstataŭ ĉevaloj. Nur relative malfrue oni komencis uzi biciklojn, sed bicikla veturado en okcidentaj usonaj urboj ankoraŭ estas malkutima afero por plenkreskuloj.

Mi havas teorion pri la framo. Ŝtelistoj forprenis ĉion eblan de la ĉenita framo de la biciklo. Bicikloj aŭ la partoj estas multe pli facile forpreneblaj ol ĉevaloj, kaj la nuntempaj punoj estas pli tolereblaj. Sed mi teorias, ke ŝteladon de bicikloj en Usono kaŭzas lingva miskompreno de la anglalingva vorto "free" (pr. 'fri'). Usonanoj alte valoregas tiun vorton, kiu troviĝas tra la tuta kulturo. Ĉie en "la lando de la (free)" oni vidas tiun vorton. Tamen, ĝi havas kelkajn malsamajn signifojn, kiujn oni pli klare distingas per malsamaj vortoj en Esperanto: "senkaptita", "libera", "liberigi", "senpaga" kaj "senkosta". Mi sugestas, ke estas homoj kiuj "liberigas" biciklojn por helpi malriĉulojn (kutime sin mem) akiri senkostajn varojn. Se ili ne povas "senkostigi" la tutan biciklon pro la ĉeno, ili "malkaptas" la pli facile forpreneblajn partojn. Do, tiu framo de biciklo estis frapa simbolo de lingva miskompreno en komunumo kie oni ne povas distingi inter "libera" kaj "senpaga". Sen rekoni ĝin, vi ja vidis alian pezan koston al la publika bonfarto, kiun kaŭzas lingva miskompreno jam solvita per Esperanto.

— via redaktoro